

Biblia Revuo



Numero 8
1966

Redaktoro: Donald Broadribb
Melburno, Aŭstralio

Ĉi tiu teksto de *Biblia Revuo 8* estis preparita per la optika signo-programo ABBYY FINEREADER EXPRESS laŭ ekzemplero de la originala numero aperinta en 1965. Nur evidentaj komposteraroj estas korektitaj.

ENHAVO

La tuta kajero konsistas el unusola teksto, la ugarita eposo pri Baal kaj Anat, tradukita el la ugarita lingvo de Donald Broadribb.

AL LA LEGANTOJ

Ĉi tiu numero de *Biblia Revuo* estas la lasta kiu aperos. Nia entrepreno estis kuraĝa provo lerni ĉu eblas aperigi daŭre seriozan materialon en Esperanto. Montriĝis ke tiu provo estas malrealisma. Ni devas, do, fini la entreprenon, kun vera bedaŭro.

Sed ni deziras esprimi nian dankon: unue, al la tre malgranda grupo da amikoj, kiuj bonvolis aboni la gazeton kaj tiel ebligi la aperon de la ok numeroj eldonitaj. Due, al la personoj kiuj kontribuis artikolojn. Kiam ni komencis la entreprenon, ni supozis ke estos eble trovi legantojn, sed malfacile trovi altkvalitajn originalajn artikolojn. Sed la inverso estis fakto: ni devis malakcepti bonajn artikolojn, pro la ĉesigo de la gazeto, dum abonantoj malofte troviĝis. Trie, al nia presisto Episkopo B. Remigio, kies tre zorga preslaboro, eksterordinara sindediĉo al la bonfarto de la gazeto, kaj nekredeble malalta prezo ebligis la aperon de la revuo. Kaj laste, al niaj amikoj, speciale S-ro J. van Keulen kaj Robert Powell, kies helpo estis nekalkuleble valora por la nelonga vivo de *Biblia Revua*.

BAAL KAJ ANAT

de Donald Broadribb

En 1929, oni komencis elfosi gravan arkeologian siton, en la antikva urbo Ugarit (nun Ras-es-šamra), en la nord-okcidenta angulo de Palestino. Ĉi tiu urbo situas ĝuste inter la Ĥita lando en Anatolio (Turkujo), kaj Fenikio, do kelkcent kilometrojn norde de la hebrea parto de Palestino. De post 1929, oni plu laboras pri tiu urbo, kaj konstante elfosas novan materialon, inter kiu estas multa literatura materialo. La literaturo estas skribita per kojn-similaj literoj sur argilaj tabuloj, populara skrib-materialo en la antikva mondo. La kojn-literoj unuavide similas al la alfabeto uzita en Mezopotamio, sed atenta rigardo montras ke tio estas iluzio.

Ne multaj monatoj bezonis forpasi, antaŭ ol oni sukcesis deĉifri la alfabeton, kaj komenci legi la enhavon de la tabuloj. Sed pruvo pri la ĝusteco de la deĉifro devis atendi ĝis post la dua mondmilito, kiam oni trovis lerneĵ-tabulojn kun la alfabeto en ĝusta ordo, kaj, pli grave, kun komparo de la ugarita kun la akada alfabetoj. (La akada alfabeto estis alfabeto uzata en Mezopotamio, kaj estas jam delonge bone konata de arkeologoj.)

Montriĝis ke la plej multaj tabuloj estas en la propra lingvo de Ugarit, do oni nomas la lingvon la *ugarita* lingvo. Kelkaj tabuloj montriĝis esti en la akada lingvo. La ugarita lingvo estas semida lingvo, kaj, kiel indikas la geografia pozicio de Ugarit, la Ugarita lingvo staras inter la hebrea kaj la akada lingvoj rilate al strukturo. Ĉar la akada kaj hebrea lingvoj estas bone konataj, kiel ankaŭ kelkaj aliaj semidaj lingvoj, oni sukcesis tuj rekoni multajn vortojn en la tekstoj. Sed ĉiu lingvo havas individuan, propran karakteron, tiel ke ankoraŭ tre multaj vortoj restas ne komprenataj. Dum la forpasado de jaroj, oni pli kaj pli sukcesis trovi, kaj pruvi, la sencon de vortoj, tiel ke ĉiujare frazoj kaj eĉ paragrafoj de teksto ricevas signifon por ni.

C. H. Gordon, jam monde konata pro sia laboro pri tekstoj sur la insulo Kreto, estas nuntage la plej eminenta filologo

laboranta pri la ugaritaj tekstoj. En sia *Ugaritic Textbook* (Romo, 1965), la plej nova el longa serio da studlibroj pri la ugarita lingvo, li prezentas por ni iom pli ol 500 tekstojn, el kiuj la plej multaj ankoraŭ ne estas tradukitaj. Estas espereble ke komplete traduko de la materialo iam estos havebla, ĉar multilate la ugaritaj tabuloj liveras al ni informon pri la antikva Palestino ĝis nun tute nekonita.

La dato de la tabuloj estas, meze, ĉ. 1400 a.K., do longe antaŭ la hebrea epoko. (Oni emas supozigi ke Moseo vivis ĉ. 1300 a.K.)

Inter la tekstoj, estas tri longaj verkoj, nome pri *Baal kaj Anat*, pri *Aqht kaj Dnil*, kaj pri *Reĝo Krt*. Ĉisube mi prezentas novan tradukon de la tabularo pri Baal kaj Anat. Sed antaŭ ol doni la tekston, estas dezirinde rimarkigi kelkajn aferojn pri ĝi.

Kiel dirite, la ugarita lingvo ankoraŭ ne estas plene komprenata. Aldone al tiu problemoj, ekzistas la konstanta ĉagreno por arkeologoj kaj lingvistoj: la tabuloj mem plejparte estas rompigitaj, aŭ la teksto ne plu estas legebla pro forfrotado de la surfaco aŭ pro aliaj kaŭzoj. Konsekvence, familiaraj al la legantoj estas tabuloj, sur kiuj nur kelkaj literoj de ĉiu linio nun estas legeblaj. Ofte granda kvanta da linioj sur tabulo ne plu legeblas. Sed pli ĉagrene estas, ke dum oni legas feliĉe, oni subite renkontas nekomprenatajn vortojn, kaj la senco de (ofte tre grava) paragrafo tute perdiĝas.

Laste, la ordo de la tabuloj ne ĉiam estas klara. Kompletaj tabuloj kutime surhavas indikon pri sia ordo, sed la nelegebla aŭ rompita karaktero de la supra kaj malsupra de la plej multaj tabuloj perdis por ni tiun indikon. Konsekvence, en la tekstoj pri Baal kaj Anat, ĉisube prezentataj, ekzistas multa necerto pri la ordo. Nome, oni facile povas dividi la tabulojn en kvar grupojn, kun kvar temoj:

1. Batalo kontraŭ la Maro
2. Batalado de Anat
3. Konstruado de Domo

4. Morto kaj Releviĝo de Baal

kaj la ordo de tabuloj en ĉiu grupo estas certa. Sed la ordo de la grupoj mem ne estas certa. Eĉ povas esti ke ni devas konkludi ke la tabuloj estas ne unu sola granda eposo, sed kolekto de sendependaj rakontoj pri Baal kaj Anat. Pro konsideroj kiuj diskutiĝos post prezento de la tekstoj, mi opinias ke la tekstoj ja formas unu eposon, kaj ke la ĝusta ordo estas tiu donita supre.

Eposo estas la ĝusta vorto por la tekstoj, ĉar ni havas longan *poemon*. Jam, en *Biblia Revuo*, mi diskutis la karakteron de Semida poezio, kaj oni povas apliki la diriton al la ugarita materialo sen modifoj.

La personoj en la teksto

Por faciligi la legadon, estas dezirinde prezenti jam antaŭe liston de la rolantoj. Krome, estas dezirinde iomete diskuti la rolantojn.

Dio (El), ankaŭ ofte nomata: Afabla, kompata Dio. La vorto El estas la Semida (hebrea kaj ugarita) normala vorto por “dio”; kaj la Kreinto, la Patro de la kosmo, simple nomiĝis “Dio” en la ugarita kaj la hebrea kulturoj. Diferenco estas, ke en la hebrea kulturo oni aprobis nur unu dion (t.e. en la Jahŭe-kulto), dum en la ugarita kulturo oni agnoskis la ekziston de diversaj sub-dioj, kies patro kaj kreinto estis Dio. Ni do distingas inter Dio (nomo) kaj dio (speco de ekzistanto).

La Sinjoro (Baal). La vorto “baal” estis ordinara Semida vorto, kun la senco “mastro,” aŭ “sinjoro,” kaj estis aplikata al ĉiu grava dio. La hebrea vorto “adon” estas samsignifa vorto; en la Malnova Testamento, oni ofte uzas kaj “baal” kaj “adon” kiel titolojn por Jahŭe. (En tradukoj, oni kutime tradukas ilin per “sinjoro”.) En la ugarita kulturo, la reĝo de la dioj, la dio kiu estras la veteron, estis La Sinjoro. Li estas la “baal” de *Baal kaj Anat*, kaj en ĉi tiu traduko mi uzis la nomon La Sinjoro, por redoni la guston de la originala teksto.

Anat. Ŝi estis la fratino de La Sinjoro, kaj tre populara

dio en Palestino. Ŝi estris militadon, kiel oni trovos en la poemo, sed ankaŭ estis la “granda patrino” de ĉiu vivanto.

Iŝtar (Aŝera, Aŝtarte, Aŝtarot): En la ugarita skribsistemo, la nomo de ĉi tiu virina dio estis skribita ‘-t-r-t-, kie la litero t estas normale transliterumata nuntempe kiel ŝ. La -t- estas normala virina gramatika indiko, kio lasas ‘-ŝ-r kiel la radikon de la nomo. Pro tio, en la Biblio oni kutime transliterumas Aŝera, kie la vokaloj estas donitaj de la masoristoj. Sed en la Ugaritaj tekstoj oni trovas ankaŭ ‘-ŝ-t-r-t-, kaj la filo de la dio estas ‘-ŝ-t-r. El tiu literumo venis la biblia kaj eksterbiblia transliterumoj Aŝtarte kaj Aŝtarot. Sed pli familiara por ni estas Iŝtar, kiu estas la sama nomo kun mezopotamiaj vokaloj. Tial, en ĉi tiu traduko mi elektis la familiaran literumon Iŝtar. Ŝi estis la edzino de Dio, kaj patrino de dio kiu malmulte rolas en la teksto, “timiga Aŝtar.”

Suno (Ŝ-p-ŝ-), virina dio kiu, kompreneble, loĝas en la ĉielo kaj ĉion vidas. Ŝi rolas, en ĉi tiu teksto, kiel paciganto.

Muziko-kaj-Memoro (K-ŝ-r- w-Ĥ-s-s-), ĉarpentista dio, kiu konstruas ĉion bezonatan de la dioj. Ofte nomata ankaŭ H-y-n-.

Vito kaj *Ugar* (G-p-n- kaj U-g-r-), mesaĝistaj dioj. Ugar estis la patrona dio de Ugarit.

P-r-d-m-n-, servisto de La Sinjoro. Li malmulte rolas en la rakonto.

Maro (Y-m-), ankaŭ nomata *Lotan* (L-t-n, Levjatan), la “malbona Serpento,” la “Monstro.” Li estas unu el la plej potencaj dioj, malamiko de La Sinjoro. Alia tre populara nomo por li estas *Juĝisto Rivero* (N-h-r-), kie “juĝisto” = “reganto.”

Morto (M-t-), dio kies karaktero jam estas tre familiara por ni.

La rakonto parolas pri eventoj okazantaj en la ĉielo, kun kelkaj scenoj sur la tero.

Teknika noto: en la sekvanta teksto, *kursiva* materialo

indikas ke mi resumas enhavon, kies karaktero ne estas prezentebla pro tro rompita stato de la tabulo. Ofte oni povas akiri la ĝeneralan sencon el tia rompita teksto, sen povi prezenti kompletajn frazojn al la legantoj.

BAAL KAJ ANAT

1.

La Batalo Kontraŭ la Maro

(Gordon, *U.T.*, tekstoj 137, 68 = III AB,B, III AB, A).

En la komenco de la tabulo, ni trovas ke disputo okazas inter Maro kaj La Sinjoro, kaj Maro minacas la Sinjoron. Maro alvokas mesaĝistojn, kaj donas al ili komunikon:

“Iru, knaboj, sen hezito,	Teksto 137, linio 13
iru al la Asembleo.	14
al Dio sur Monto L-l-.	
Ne klinu vin antaŭ la Asembleo —	15
Diru vian komunikon,	16
informu Dion, la Patron, la Virbovon,	
sciigu al la Asembleo:	
Jen vorto de via mastro, Maro,	17
de via sinjoro, Juĝisto Rivero:	
Transdonu la dion kiun vi protektas,	
kiun protektas la popolo,	
Transdonu la Sinjoron, por ke mi rigardu lin,	18
la filon de Greno, por ke mi rabu lin.”	19
La servistoj iris, sen hezito,	
iris al Monto L-l-,	20
al la Asembleo,	
kie sidis la dioj . . . ,	
La sanktuloj pretis manĝi,	21
la Sinjoro servis Dion.	
Tuj kiam la dioj vidis ilin,	22
vidis la mesaĝistojn de Maro,	
la senditojn de Juĝisto Rivero,	

La dioj klinis siajn kapojn al la genuoj, sur siaj reĝaj seĝoj.	23
La Sinjoro riproĉis ilin,	24
“Dioj, kial vi klinis viajn kapojn al la genuoj, sur viaj reĝaj seĝoj?”	24
Dioj, vi devos respondi la tabulojn de la mesaĝistoj de Maro, de la senditoj de Juĝisto Rivero.	26
Dioj, levu viajn kapojn de sur la genuoj, de viaj reĝaj seĝoj.	27
Mi mem respondos al la mesaĝistoj de Maro, al la senditoj de Juĝisto Maro.”	28
La dioj levis siajn kapojn de sur la genuoj, de siaj reĝaj seĝoj.	29
Kiam venis la mesaĝistoj de Maro, la senditoj de Juĝisto Rivero antaŭ Dion, Ili ne klinis sin antaŭ la Asembleo. — Ili diris sian komunikon.	30
<i>(sekvas nekomprenebla linio)</i>	
Ili diris al Dio, la Patro, la Virbovo:	31
“Jen vorto de via mastro, Maro, de via sinjoro, Juĝisto Rivero:	33
Transdonu la dion, kiun protektas la popolo, transdonu la Sinjoron, por ke mi rigardu lin, la filon de Greno, por ke mi rabu lin.”	34
Dio, la Patro, la Virbovo, respondis:	35
“La Sinjoro estas via sklavo, Maro; La Sinjoro estas via sklavo, la filo de Greno estas via kaptito.	36
Li donos al vi tributon, kiel la aliaj dioj; li donos al vi tributon, kiel la aliaj sanktuloj.”	37
La Sinjoro, la Princo, furiozis.	38
Li prenis batilon enmane, hakilon enmane, li batis la servistojn.	39
Anat (?) prenis lian dekstran brakon,	40

Iŝtar (?) lian maldekstran brakon:	
Kiel vi povas bati la mesaĝistojn de Maro, la senditojn de Juĝisto Rivero?	41
Mesaĝiston (<i>sur la ŝultron</i>) mesaĝiston sur la dorson?”	42
Ŝia mastro respondis —	

*La Sinjoro diras ke li rifuzas agnoski la minacon de Maro,
kaj ke li intencas batali kontraŭ li. Muziko-kaj-Memoro
promesas helpi, kaj transdonas al li du batilojn:*

Muziko-kaj-Memoro diris:	Teksto 68:7
“Mi diras al vi, Sinjoro Princo, mi diras al vi, Nub-Rajdanto,	8
Nun, Sinjoro, viajn malamikojn, nun vi batos viajn malamikojn, nun vi detruos viajn kontraŭanto.	9
Vi transprenos vian eternan regnon, vian senfinan regadon.”	10
Muziko alportis du batilojn, li donis al iii nomojn:	11
“Via nomo estas Elpelu: elpelu Maron	12
Elpelu Maron de lia trono, Riveron de lia reĝa seĝo!	13
Suben iru, en la manoj de la Sinjoro, kiel aglo inter liaj fingroj.	
Batu la dorson de Princo Maro, inter la ŝultroj de Juĝisto Rivero.”	14
La batilo suben iris, en la manoj de la Sinjoro, kiel aglo inter liaj fingroj.	15
Ĝi batis la dorson de Princo Maro, inter la ŝultroj de Juĝisto Rivero.	16
Sed Maro ne cedis, lia dorso ne tremis, lia korpo ne rompiĝis.	17
Muziko alportis du batilojn, li donis al ili nomojn:	18

Baal kaj Anat

“Via nomo estas Elĉasu:	19
elĉasu, elĉasu, Maron,	
Elĉasu Maron de lia trono,	
Riveron de lia reĝa seĝo!	20
Suben iru, en la manoj de la Sinjoro;	21
kiel aglo inter liaj fingroj.	
Batu la kapon de Princo Maro,	22
inter la okuloj de Juĝisto Rivero.	
Kolapsu Maro,	
li falu teren.”	23
La batilo suben iris, en la manoj de la Sinjoro,	
kiel aglo inter liaj fingroj.	24
Ĝi batis la kapon de Princo Maro,	
inter la okuloj de Juĝisto Rivero.	25
Kolapsis Maro,	
li falis teren.	26
Lia dorso tremis,	
lia korpo rompiĝis.	
La Sinjoro trenis Maron,	27
volis detrui Juĝiston Riveron,	
Iŝtar riproĉis lin, nomante lin:	28
“Hontu, Potenca Sinjoro!	
Hontu, Nub-Rajdanto!	29
Princo Maro estas nia kaptito,	
Juĝisto Rivero estas nia kaptito.”	30
Kiam (<i>ŝi diris tion</i>),	
hontis la Potenca Sinjoro.	
<i>Maro do ne mortis, sed li agnoskis ke de nun La Sinjoro estas</i>	
<i>la mastro, kiun li servos.</i>	

2.

La Batalado de Anat

(Gordon, *U.T.*, teksto ‘nt).

En la komenco de la tabulo, La Sinjoro manĝas dum bankedo, dum Anat (kiel ni vidos) okupas sin aliloke.

P-r-d-m-n- servis al la Potenca Sinjoro, helpis la Sinjoron, Princon de la Tero.	Kolumno 1: 2 3
Li staris, preta servi lin, li donis al li mampecon, per akra tranĉilo tranĉis grasan pecon.	4-5 6 7-8
Li elverŝis por li drinkaĵon, li metis en lian manon tason, vinglason en liajn manojn.	9 10 11
<i>La glaso estis eksterordinare eleganta:</i>	
Kian neniam vidis virino, glaso kian neniam vidis eĉ Aŝera.	14 15
Li prenis mil potojn da vino, enmiksitis nekalkuleblan nombron da ujoj.	16 17
Li staris, li kantis, La cimbaloj sonoritis en liaj lertaj manoj.	18 19
La knabo kun bela voĉo kantis, pri la Sinjoro sur la Altaĵo de Capan.	20 21
La Sinjoro rigardis siajn filinojn, rigardis P-d-r-ion, filinon de Lumo, kaj Roson, filinon de Pluvo.	22 23 24

Dum la Sinjoro bankedas, Anat okupas sin per milito. En la sekvanta teksto, la vortoj “fortege” kaj “la urbanoj” estas egale tradukeblaj “en la valo” kaj “inter la urboj.”

Nun Anat batalis fortege, ŝi militis kontraŭ la urbanoj.	II: 5 6
Ŝi militis kontraŭ la okcidenta popolo, ŝi detruis la orientan popolon.	7 8
Sub ŝi svarmis kapoj kiel vulturoj, super ŝi manoj kiel lokustoj.	9 10
<i>Evidente Anat sukcese buĉis multajn homojn.</i>	
Ŝi vadis ĝisgenue en la sango de soldatoj, ĝiskole en la sango de batalistoj.	14
Per batilo ŝi elpelis (<i>ilin</i>), elpelis ilin per la dorso de pafarko.	15 16
Post tio, Anat iris al sia domo,	17

la diino venis al sia palaco.	18
Ŝi ankoraŭ ne ĝis-sate batalis fortege,	19
militis kontraŭ la urbanoj.	20
Ŝi ĵetis seĝojn kontraŭ la soldatojn,	21
ŝi ĵetis tablojn kontraŭ la batalantojn,	
piedapogilojn kontraŭ la militistojn.	22
Ŝi batalis senpaŭze, poste rigardis;	23
Anat militis, poste vidis.	24
Ŝi ridis aplombe,	25
ĝojo plenigis ŝian koron,	26
ĉar en la manoj de Anat estis venko.	
Ŝi vadis ĝisgenu en la sango de soldatoj,	27
ĝiskole en la sango de batalistoj.	28
Ŝi batalis, ĝis ŝi estis sata,	29
en la domo, ŝi batalis inter la tabloj,	30
Ŝi elverŝis sangon de soldatoj,	31
elverŝis pac-oleon en ujon.	
Juna Anat lavis siajn manojn,	32
la Patrino de Nacioj lavis siajn fingrojn.	33
Lavis siajn manojn per la sango de soldatoj,	34
siajn fingrojn per la sango de batalistoj,	35
<i>Anat nun reordigis sian domon,</i>	
Ŝi elverŝis akvon, por lavi sin,	38
rosan de la ĉielo;	39
Oleon de la tero,	
pluvon de la Nub-Rajdanto,	
Roso fluis de la ĉielo,	40
pluvo fluis de la steloj.	41

La Sinjoro sciigis pri la agado de Anat, kaj li tre koleris pro la afero. Sed kiel ĉesigi la militadon? Li faris planon: li alvokis mesaĝistojn, kaj donis al ili specialan komunikon por Anat. Li diris al ili:

“Klinu vin antaŭ la piedoj de Anat,	III: 6
surteren falu,	7
honoru ŝin.	
Diru al Juna Anat,	8

diru al la Patrino de Nacioj,	9
“Jen komuniko de la Potenca Sinjoro,	10
vorto de la Potenca Hakilo:	11
Vi, amanta militadon,	
verŝu amikecon sur la grundon,	12
Verŝu pacon sur la Teron,	13
pacon sur la kamparon.	14
Viaj <i>{sanktaj insignoj}</i> estas kun mi.	15
Kurigu viajn piedojn al mi,	16
rapidigu viajn krurojn,	17
Ĉar vorton mi deziras diri,	18
ion por vi mi komunikos.	
Mi aŭdigos al vi ion,	19
Vorton de arbo,	20
flustron de ŝtono,	
Kiel parolas la ĉielo al la tero,	21
kaj Oceano kun la steloj.	22
Mi komprenas fulmon kian ne konas la ĉielo,	23
vortojn kiajn ne konas la homaro,	24
kiajn ne komprenas la terhomoj.	25
Venu, mi montros:	
Sur mia dia Monto Capan,	'26
sur mia sankta monto,	27
sur mia bela Monto T-li-j-t.”	28
Anat vidis la diojn,	29
ŝiaj piedoj tremis sub ŝi,	
Ŝia dorso agitiĝis,	30
ŝia vizaĝo ŝvitis	
Ŝiaj vertebroj skuiĝis,	31
<i>(ŝia dorso malkvietiĝis.)</i>	32
Ŝi elkriis:	33
“Kial venis Vito kaj Ugar?	
Kiu malamiko levis sin kontraŭ la Sinjoro?	'34
Kiu minacas la Nub-Rajdanton?	35
Ĉu mi ne detruis la Maron, la Amaton de Dio?	
Ĉu mi ne mortigis la grandan, dian Riveron?	36

Ĉu mi ne buŝumis la Drakon,	37
buŝumis kaj detruis la tordiĝantan Serponton?	38
la Princon kun sep kapoj?	39
Mi detruis la Amaton de Dio,	40
morta sur la tero estas la dia bovido ‘-t-k-.	41
Mi detruis la dian hundon Fajro,	42
mi mortigis la filinon (?) de dia Muŝo.	43
Mi (<i>sukcesoplene</i>) batalis	44
tiun, kiu pelis la Sinjoron de la Altaĵo de Capan,	
(<i>fortranĉis</i>) liajn orelojn kiel de birdo,	(IV) 45
pelis lin de lia reĝa seĝo,	46
de lia posteno, de lia reĝa trono.	47
Kiu malamiko levis sin kontraŭ la Sinjoro?	48
Kiu minacas la Nub-Rajdanton?	
Respondis la servistoj,	49
“Neniu malamiko levis sin kontraŭ la Sinjoro.	
Neniu minacas la Nub-Rajdanton.	50
Jen komuniko de la Potenca Sinjoro,	51
vorto de la Potenca Hakilo:	
Vi, amanta militadon,	52
verŝu amikecon sur la grundon,	53
Verŝu pacon sur la Teron,	54
pacon sur la kamparon.	
Viaj (<i>sanktaj insignoj</i>) estas kun mi.	55
Kurigu viajn piedojn al mi,	56
rapidigu viajn krurojn,	
Ĉar vorton mi deziras diri,	57
ion por vi mi komunikos.	
Vorton de arbo,	58
flustron de ŝtono,	
Vorton kiajn ne konas la homaro,	59
kiajn ne komprenas la terhomoj;	60
Kiel parolas la ĉielo al la tero,	
kaj Oceano kun la steloj.	61
Mi komprenas fulmon kian ne konas la Ĉielo,	62
venu, mi montros:	

Sur mia dia Monto Capan,	63
sur mia sankta monto.”	64
Juna Anat respondis,	65
diris la Patrino de Nacioj,	66
“Mi, amanta militadon,	67
verŝos amikecon sur la grundon.	68
Verŝos pacon sur la Teron,	
pacon sur la kamparon.	69
<i>Anat diras ke la Sinjoro pretiĝu.</i>	
Mi, amanta militadon,	72
verŝos amikecon sur la grundon.	73
Verŝos pacon sur la Teron,	74
pacon sur la kamparon.	75
Ion pli mi diras al vi:	
Iru, iru, dioj;	76
vi malrapidas, mi rapidas.	77
U‘-r- ne estas malproksime de la dioj,	78
I-n-b-b- ne estas malproksime de la dioj;”	79
<i>la distanco ne estas tre granda.</i>	
Ŝi ekiris, celante la Sinjoron sur la Altaĵo de Capan,	81
Mil kampojn ŝi transiris,	82
milojn da spacoj.	
La Sinjoro vidis ke venas lia fratino,	83
ke proksimiĝas la filino de lia patro.	84
Li forsendis siajn edzinojn for de ŝi,	
Li metis bovon antaŭ ŝin,	85
grasan beston antaŭ ŝin.	
Ŝi elverŝis akvon, por lavi sin,	86
roson de la ĉielo,	87
Oleon de ia tero	
Roso fluis de la ĉielo,	
pluvo fluis de la stelo.	88
<i>Anat kaj La Sinjoro manĝis, kaj dume, La Sinjoro sciigis</i>	
<i>al ŝi la gravan komunikaĵon, nome ke:</i>	
“La Sinjoro ne havas domon, kiel la dioj,	V: 1
ne havas palacon kiel la filoj de Aŝera,	

Kiel la domon de Dio, la domon de lia filo,	
La domon de Sinjorino Aŝera de la Maro,	2
la domon de P-d-r-j-, filino de Lumo,	3
La domon de Roso, filino de Pluvo,	4
la domon de Tero, filino de J- ^ʿ -b-d-r-,	
La domon de la famaj edzinoj.”	5
Juna Anat respondis,	6
“Mia Patro, Dio, la Virbovo, diros al mi	7
<i>permeson ke oni konstruu palacon por La Sinjoro. Se Dio</i>	
<i>rifuzos tiun permeson,</i>	
Mi tretos sur li kiel sur ŝafido sur la tero,	9
Mi fluigos sangon sur liaj grizaj haroj,	10
mi kovros lian grizan barbon per sango,	11
Se li ne donos al la Sinjoro domo kiel de la dioj,	
domon kiel de la filoj de Aŝera.”	12
Si ekiris, rapidis trans la tero,	13
ekiris celante Dion,	
ĉe la fontoj de la riveroj,	14
inter la kurentoj de Oceano,	
Ŝi iris al la loĝejo de Dio,	15
iris al la Tre Aĝa Patro.	
<i>Anat parolis kun Dio, la Patro, la Virbovo, kaj ankaŭ al li</i>	
<i>ŝi bezonis ripeti sian minacon:</i>	
“Mi fluigos sangon sur viaj grizaj haroj,	32
mi kovros vian grizan barbon per sango	33
Dio, en la Sep Ĉambroj, respondis,	34
Dio, en la Ok loĝ-fakoj:	
“Mi scias, mia filino, ke vi estas afabla,	35
ke sinregon kiel vian oni ne povas trovi inter la diinoj.	36
Kion vi volas, Juna Anat?”	
Juna Anat diris,	37
“Dio, saĝa estis via dekreto,	38
ĉar vi estas eterne saĝa.	39
Vi dekretis ke la Potenca Sinjoro nin regu,	40

Li estu nia plejsupera reĝo.”	41
<i>Anat plu parolas pri la alia valoro de La Sinjoro,</i>	
“Li apelas al sia Patro, Dio, la Virbovo,	43
al Dio, la Reĝo, kiu lin faris.	44
Li apelas al Aŝera kaj ŝiaj filoj,	
al la Diino kaj ŝia familio:	45
La Sinjoro ne havas domon, kiel la dioj,	46
ne havas palacon kiel la filoj de Aŝera,	47
Kiel la domon de Dio,	
la domon de lia filo,	48
La domon de Sinjorino Aŝera de la Maro,	
la domon de P-d-r-j-, filino de Lumo,	49
La domon de Roso, filino de Pluvo,	50
la domon de Tero, filino de J- ^c -b-d-r-,	51
La domon de la famaj edzinoj.”	VI: 1
<i>Dio decidas ke estas dezirinde konsulti Muzikon-kaj-Memoron, la konstruiston. Li alvokas mesaĝiston, ĉifoje la mesaĝiston de Sinjorino Aŝera de la Maro, ŝian “fiŝiston”:</i>	
“Iru, Fiŝisto de Aŝera,	10
marŝu, Q-d-ŝ- w-Am-r-r-,	11
Iru al dia Ĥ-q-k-p-t-, ...	12-13
al Kreto, kie li havas sian tronon,	14
Al Ĥ-k-p-t-, la lando kiun li posedas,	15-16
“Trans milon da kampoj,	17
milojn da spacoj.	18
Klinu vin antaŭ Muziko,	19
honoru lin.	20
Diru al Muziko-kaj-Memoro,	21
raportu al la metiisto H-j-n:	22-23
Jen komuniko de la Potenca Sinjoro,	24
vorto de la Potenca Hakilo:	25
Viaj (<i>sanktaj insignoj</i>) estas kun mi.	IX. II: !
Kurigu viajn piedojn al mi,	2
rapidigu viajn krurojn.	3

La sekvanta parto de la teksto ne estas sufiĉe legebla

por prezento. Ŝajnas ke Anat mem ricevas taskon, fine, transkomuniki la mesaĝon al Muziko-kaj-Memoro, kaj la enhavo estas precize la vortoj kiujn ŝi ricevis antaŭe.

3.

Konstruado de Domo

(Gordon, *U.T.*, teksto 51, = II AB).

Anat, fine, ne sukcesis akiri permeson ke La Sinjoro konstruigu por si novan palacon. La Sinjoro nun havas novan planon. Li unue ripetas al Anat la problemon:

“La Sinjoro ne havas domon, kiel la dioj,	1: 11
ne havas palacon kiel la filoj de Aŝera,	12
Kiel la domon de Dio,	13
la domon de lia filo,	
La domon de Sinjorino Aŝera de la Maro,	14-15
la domon de la famaj edzinoj,	16
La domon de P-d-r-j-, filino de Lumo ⁵	17
la domon de Roso, filino de Pluvo,	18
la domon de Tero, filino de J- [‘] -b-d-r-.	19
Ion pli mi diras al vi:	20
Iru, petu de Sinjorino Aŝera de la Maro,	21-22
apelu al la Kreintino de la dioj,	23
Supreniru H-j-n- al la bloviloj,	24
Memoro tenu la premilojn per siaj manoj,	25
Li muldu arĝenton,	26
formigu oron,	
Li muldu milojn da sikloj da oro	
Formigu kvantegojn da sikloj da arĝento,	28-29
muldu arĝenton kaj oron,	30
Por fari belaĵon kun valoro de 20000 sikloj,	31
belaĵon kovritan per arĝento,	32
kovritan per oro;	33
Kaj belan tronon,	34

sidejon supre, belan piedapogilon malsupre. ...	35-36
Kaj belajn sandalojn, kun rimenoj.	37
Li alportu por ili oron de bela tablo,” <i>ĝenerale, li faru multvalorajn aĵojn.</i>	38
<i>La Sinjoro kaj Anat do iras al Sinjorino Aŝera de la maro. Ŝi honoradas Dion, kiam ŝi ekvidas ilin:</i>	
Ŝi (<i>preĝis</i>) al la Kompata Dio, ja Virbovo,	11:10
ŝi petadis la Kreinton.	11
Kiam ŝi levis siajn okulojn, ŝi vidis, ke venas la Sinjoro,	12
kiam rigardis Aŝera, venis Juna Anat,	13-14
proksimiĝis la Patrino de Nacioj.	15
Ŝiaj piedoj tremis sub ŝi,	16-17
ŝia dorso agitiĝis,	18
Ŝia vizaĝo ŝvitis,	
ŝiaj vertebroj skuiĝis,	19
(ŝia dorso malkvietiĝis.)	20
Ŝi elkriis:	
“Kial venas la Potenca Sinjoro?”	22
Kial venas Juna Anat?”	23
<i>Sinjorino Aŝera de la Maro estas tre maltrankvila unue. Sed ŝi vidas la multvalorajn donacojn, kiujn alportas por ŝi La Sinjoro kaj Anat, kaj tio helpas ŝin amikiĝi. Ni lernas ke La Sinjoro jam kolere konigis sian malplezuron, en la Asembleo de la Dioj:</i>	
Li levis sin,	11: 13
li kraĉis en la Dia Asembleo:	14
“Mi trinkis ĉagrenon ĉe mia tablo,	15
mi trinkis honton el taso.	16
La Sinjoro abomenas du specojn de bankedoj:	17
La Nub-Rajdanto malamas tri specojn de bankedoj:	18
Hontindajn bankedojn,	19
avarajn bankedojn,	
bankedojn kun misuzo de sklavinoj.	20
Nun, videblas hontindeco.	21

Nun, estas misuzo de sklavinoj.”	22
Post la alveno de la Potenca Sinjoro,	23
post la alveno de Juna Anat,	24
Ili petis Sinjorinon Aŝera de la Maro,	25
ili pledis kun la Kreintino de la dioj.	26
Sinjorino Aŝera de la Maro respondis,	27
“Kial vi pledas kun Sinjorino Aŝera de la Maro?”	28
Kial vi petas la Kreintinon de la dioj?	29-30
Ĉu vi jam pledis kun la Kompata Dio, la Virbovo?	31
Ĉu vi jam petis la Kreinton?”	32
Juna Anat respondis,	33
“Ni jam pledis, Sinjorino Aŝera de la Maro,	34
Ni petis, Kreintino de la dioj.”	
<i>Ŝi diras ke ŝi parolis kun Dio, la Patro, la Virbovo, dum bankedo de la dioj, sensukcese. Sinjorino Aŝera de la Maro akceptas mem pledi por ili:</i>	
“Selu azenon,	IV: 5
pretigu rajdbeston,	
Surmetu arĝentan selon,	
surmetu oran rajdilon.	6
Preparu la selon de mia azeno.”	7
Q-d-ŝ- w-Am-r-r obeis.	8
Li selis azenon,	9
pretigis rajdbeston.	
Li surmetis arĝentan selon,	10
li surmetis oran rajdilon,	11
li preparis la selon de ŝia azeno.	12
Q-d-ŝ- w-Am-r-r helpis ŝin,	13
Li metis Aŝeran sur la dorson de la azeno,	14
sur la belan dorson de la azeno,.	15
Q-dŝ- komencis konduki,	16
brilante kiel stelo antaŭ ili.	17
Juna Anat marŝis,	18
kaj La Sinjoro reiris al la Altaĵo de Capan.	19
Ŝi ekiris, celante Dion ĉe la fontoj de la riveroj,	20-21
inter la kurentoj de Oceano.	22

Si iris al la loĝejo de Dio,	23
iris al la Tre Aĝa Patro.	24
Ŝi klinis sin antaŭ Dio,	25
ŝi surteren falis kaj honoris lin.	26
Kiam Dio vidis ŝin,	27
li malfermis siajn makzelojn kaj ridis.	23
Li metis siajn piedojn sur la apogilon,	29
kaj kunplektis siajn manojn.	30
Dio ekkriis:	
“Kial venas Sinjorino Aŝera de la Maro?	31
Kial alvenis la Kreintino de la dioj?	32
Certe ĉar vi malsatas	33
certe ĉar vi soifas	34
Manĝu kaj trinku.	35
Manĝu de la tablo,	36
Trinku vinon el la glasoj,	37
vinbersukon el la oraj taso.	
Aŭ ĉu eble la amado de la Reĝo, la amado de Dio, vekis vin? 38	
Ĉu la amado de la Virbovo vigligis vin?”	39
Sinjorino Aŝera de la Maro respondis,	40
“Dio, saĝa estis via dekreto,	41
ĉar vi estas eterne saĝa;	42
vi estas la favorplena.	
Vi dekretis ke la Potenca Sinjoro nin regu,	43
li estu nia plejsupera reĝo.	44
<i>Aŝera plu parolas pri la alta valoro de la Sinjoro.</i>	
“Li apelas al sia Patro, Dio, la Virbovo,	47
al Dio, la Reĝo, kiu lin faris.	48
Li apelas al Aŝera kaj ŝiaj filoj,	49
al la Diino kaj ŝia familio:	
La Sinjoro ne havas domon, kiel la dioj,	50
ne havas palacon kiel la filoj de Aŝera,	51
Kiel la domon de Dio,	52
la domon de lia filo,	
La domon de Sinjorino Aŝera de la Maro,	53
la domon de la famaj edzinoj,	54

La domon de P-d-r-j-, filmo de Lumo	55
la domon de Roso, filino de Pluvo,	56
la domon de Tero, filino de J-‘-b-d-r-”	57
Afable, kompata Dio respondis,	58
“Mi aranĝos, diino Aŝera,	59
mi aranĝos.	60
Prenu fosileton,	61
sklavino pretigu brikojn.	
Konstruiĝu domo por La Sinjoro	62
kiel de la dioj,	V: 63
kiel de la filoj de Aŝera.”	
SinJORINO Aŝera de la Maro respondis,	64
“Dio, vi estas tre saĝa,	65
via maljuneco ja instruis al vi;	66
<i>nun La Sinjoro povos prizorgi la veteron, laŭ sia speciala tasko:</i>	
Li muĝu de la nuboj,,	70
li fulmu al la tero.	71
Li faru domon el cedra ligno,	72
domon el brikoj.	73
Oni diru al la Potenca Sinjoro:	74
Elkriu la planojn por via domo,	75
preparojn por via palaco.	76
La montoj donos al vi abundan arĝenton,	77
la montetoj puran oron.	78
La mino donos al vi ŝtonon,	79
por konstrui arĝentan kaj oran domon,	80
domon de lazurŝtonoj.”	81
Juna Anat ĝoje ekiris,	82
ŝi rapidis trans la teron,	83
Al la Sinjoro sur la Altaĵo de Capan,	84
trans mil kampoj,	85
miloj da spacoj.	86
Juna Anat ĝoje elkriis,	87
ŝi kriis sian komunikon al la Sinjoro:	88
“Informiĝu, Sinjoro,	89

mi havas por vi informon.	
Konstruu por vi domon kiel de viaj fratoj!	90
domon kiel de via familio.	91
Elkriu la planojn por via domo,	
preparojn por via palaco.	92
La montoj donos al vi abundan arĝenton,	93
la montetoj puran oron,	94
Por konstrui arĝentan kaj oran domon,	95
domon de lazurŝtonoj.”	96
La Potenca Sinjoro ĝojis.	97
Li elkriis ia planojn por sia domo,	98
preparojn por sia palaco.	99
La montoj donis al li abundan arĝenton,	100
la montetoj puran oron,	101
La mino donis al li ŝtonon.	102
Li venigis Muzikon-kaj-Memoron,	103
mesaĝistoj sendiĝis por informi lin,	104-105
Kiam Muziko-kaj-Memoro alvenis,	10(1
li metis bovon antaŭ lin,	107
grasan beston antaŭ lin.	108
Oni alportis seĝon,	109
li sidis dekstre de la Potenca Sinjoro.	
Ili manĝis kaj trinkis.	110
<i>La Potenca Sinjoro komunikis sian planon:</i>	
Rapide, konstruu domon,	113
rapide, pretigu palacon!	114
Rapide, vi konstruu domon,	115
rapide, vi pretigu palacon	116
sur la Altaĵo de Capan:	117
Domon larĝa mil kampojn,	118
palacon ampleksanta milojn da spacoj.”	119
Muziko-kaj-Memoro diris,	120
“Aŭskultu, Potenca Sinjoro,	121
pripensu, Nub-Rajdanto,	122
Mi metu fenestron en la domon,	123
aperturon en la palacon.”	124

La Potenca Sinjoro respondis,	125
“Ne metu fenestron en la domon,	126
neniun aperturon en la palacon.”	127
<i>La diskuto daŭris:</i>	
Muziko-kaj-Memoro diris,	VI: 1
“Vi iam akceptos mian vidpunkton.”	2
Muziko-kaj-Memoro diris,	3
“Aŭskultu, Potenca Sinjoro,	4
“Mi metu fenestron en la domon,	5
aperturon en la palacon.”	6
La Potenca Sinjoro respondis,	7
“Ne metu fenestron en la domon,	8
neniun aperturon en la palacon	9
Por ke P-d-r-j- filino de Lumo, ne (<i>forkuru</i>),	10
por ke Roso, filino de Pluvo, ne (<i>eskapu</i>)”	11
<i>Li imagas plurajn nedezirindajn situaciojn.</i>	
Muziko-kaj-Memoro diris,	14
“Sinjoro, vi iam akceptos mian vidpunkton.	15
Oni konstruis lian domon,	16
oni pretigis lian palacon.	17
Oni mendis de Libano, kun ties arboj,	18
de Sirio kun ties valoraj cedroj,	19
De Libano, kun ties arboj,	20
de Sirio kun ties valoraj cedroj.	21
Fajro metiĝis sur la domon,	22
flamoj sur ia palacon.	23
1 tagon, 2 tagojn, fajro manĝis la domon,	24
flamoj kovris la palacon.	25
3 tagojn, 4 tagojn, fajro manĝis la domon,	26-27
flamoj kovris la palacon.	28
5 tagojn, 6 tagojn, fajro manĝis la domon,	29
flamoj kovris la palacon.	30-31
En la sepa tago, la fajro forlasis la domon,	32
la flamoj la palacon.	33
La arĝento fandita iĝis kubo,	34
la oro fandita iĝis brikoj.	35

La Potenca Sinjoro ĝojis,	36
“Mi konstruis mian domon per arĝento,	37
mian palacon per oro.”	38
La domo de la Sinjoro estis preta,	39
Hadad estis preta.	
Li oferis bovojn kaj kaprojn,	40
buĉis virbovojn kaj grasbestojn,	41
ŝafojn kaj junajn bovidojn,	42
ŝafidojn, kaj kapridojn	43
Li invitis siajn fratojn al la domo,	44
sian familion al la palaco.	45
Li invitis la 70 filojn de Aŝera,	46
Li donis al la ŝaf-dioj vinon, ke iii trinku;	47
li donis al la ŝafin-diinoj vinon, ke ili trinku;	48
Li donis al la virbov-dioj vinon, ke ili trinku;	49
li donis al la bovin-diinoj vinon, ke ili trinku;	50
Li donis al la tron-dioj vinon, ke ili trinku;	51
li donis al la seĝ-diinoj vinon, ke ili trinku;	52
Li donis al la vaz-dioj vinon, ke ili trinku;	53
li donis al la pot-diinoj vinon, ke ili trinku.	54
La dioj manĝis kaj trinkis,	55
la mamsuĉantoj drinkis,	56
Per akra tranĉilo ili tranĉis grasan pecon,	57
ili trinkis vinon el la glasoj,	58
vinbersukon el la oraj tasoj.	

*Post la bankedo, La Sinjoro, nun vere Reĝo de la dioj,
iras al la tero kaj konkeras por si urbojn, por havi re-
gatojn:*

Li reiris al ia urboj.	VII: 8
La Sinjoro kaptis 66 vilaĝojn,	9
77 urbojn,	10
80 vilaĝojn,	11
90 urbojn.	12
La Sinjoro reiris al la domo.	13
La Potenca Sinjoro diris,	14
“Mi ja faros, Muziko, filo de Maro,	15

Memoro, filo de ‘-d-t-,	16
Estu fenestro en la domo,	17
aperturo en la palaco.”	18
<i>Per tio li povos muĝi de la nuboj.</i>	
Muziko-kaj-Memoro ridis,	21
Muziko-kaj-Memoro elkriis:	22
“Mi ja diris, Potenca Sinjoro,	23
ke vi iam akceptos mian vidpunkton.”	24
Li faris fenestron en la domo,	25
aperturon en la palaco.	26
<i>La Sinjoro malfermis la fenestron; de la nuboj li muĝis per sia sankta voĉo; lia voĉo skuis la teron. Unue, la malamikoj de la Sinjoro terurite kuris al la arbaroj:</i>	
Tiam diris la Potenca Sinjoro,	37
“Kial vi (<i>kuras al la arbaroj</i>), malamikoj de Hadad?	38
Kial vi (<i>rapidas al la flanko de la monto</i>)?”	39
<i>Li rigardis la teron, sed li vidis ion vere timigan, pri kio li antaŭe ne sciis:</i>	
La Sinjoro reiris plorante al sia domo:	42
“Aŭ reĝo, aŭ ordinarulo,	43
arogis al si regadon de la tero.	44
Mi sendu Dalilon al Dia Morto,	45
‘-d-d-on al la Amata Heroo de Dio.”	46
Morto pripensadis,	47
la Amato meditadis:	48
“Nur mi devas regi la diojn,	49
ordoni kaj diojn kaj homojn,	50-51
komandi la homaron de la tero.”	52
La Sinjoro kriis al siaj servantoj,	53
li rigardis al Vino kaj Ugar, filoj de ’almat,	54
al Akvoj, filoj de ʾ-l-m-t-.	55
<i>Al la mesaĝistoj la Sinjoro donis instrukciojn:</i>	
“Vi devas ekiri al Monto T-r-‘-z-z-,	VIII: 1-2
al Monto Ŝ-r-m-g-,	3
al la sulkoj de fekunda grundo.	4
Levu la monton per viaj manoj,	5

la monteton per viaj manplatoj,	6
Subeniru en la subteron,	7
kalkuliĝu kiel homoj enirantaj la teron.	8-9
Ekiru al lia urbo, Pereo,	10-11
kie li sidas sur sia trono,	12
en sia regno.	13 14
Sed atentu, dioj,	15
ne proksimiĝu al Dia Morto,	16
por ke li ne traktu vin kiel ŝafviandon en sia buŝo,	17-18
por ke vi ne rompiĝu kiel ŝafo inter liaj makzeloj.	19
La Suno, la Dia Lumo, brilas,	20-22
sed la ĉielo haltas, pro la Die favorata Morto.	23-24
Transiru mil kampojn,	25
milojn da spacoj.	26
Klinu vin antaŭ la piedoj de Morto,	27
surteren falu,	28
honoru lin.	
Diru al Dia Morto,	29-31
al la Amata Heroo de Dio:	32
“Jen komuniko de la Potenca Sinjoro,	33
vorto de la Potenca Hakilo:	34
Mi konstruis domon per arĝento,	35-36
palacon per oro.”	37

La restanta parto de la komuniko estas perdita. Sed la sekvanta teksto montras ke La Sinjoro devas agnoski la pretendon de Morto. Morto donas defion, kiun la mesaĝistoj devos porti al La Sinjoro:

4.

La Morto kaj Releviĝo de Baal

(Gordon, *U.T.*, tekstoj 67, 62, 49 = I*AB, I AB).

“Ĉar vi frapis Lotanon, la malbonan Serponton,	1: 1
ĉar vi detruis la tordiĝantan Serponton,	2
la Princon kun sep kapoj,	
<i>vi devos esti punata,</i>	3
Vi subeniros en la gorgon de Dia Morto,	7

en la kolon de la Amata Heroo de Dio.”	8
La dioj foriris, kaj ne revenis,	9
ili ekiris celante La Sinjoron sur la Altaĵo de Capan.	10-11
Vino kaj Ugar diris,	12
“Jen komuniko de Dia Morto,	
vorto de la Amata Heroo de Dio:	13
Kiel leonino avidas manĝi ŝafon antaŭ si,	14
<i>tiel mi avidas manĝi vin. Vi subeniros kaj devos esti parto-</i>	
<i>prenanto de miaj bankedoj ĉi tie,</i>	
Ĉar vi frapis Lotanon, la malbonan Serponton,	27-28
ĉar vi detruis la tordiĝantan Serponton,	29
la Princon kun sep kapoj,”	30
<i>vi devos esti punata, devos eniri la gorĝon de Morto.</i>	
<i>Kiam la Potenca Sinjoro aŭdis la defion,</i>	
La Potenca Sinjoro timis lin,	11: 7
la Nub-Rajdanto terurigiĝis pro li.	
“Iru, diru al Dia Morto,	8
al la Amata Heroo de Dio:	9
Jen komuniko de la Potenca Sinjoro,	10
vorto de la Potenca Hakilo:	
Saluton al Dia Morto.	11
mi estas via eterna sklavo.”	12
La dioj foriris, kaj ne revenis,	13
ili ekiris celante Dian Morton	14
en ties urbo, Pereo,	15
kie li sidis sur sia trono,	
en sia regno.	16
Ili elkriis:	17
“Jen komuniko de la Potenca Sinjoro,	
vorto de la Potenca Hakilo:	18
Saluton al Dia Morto.	19
mi estas via eterna sklavo.”	20
Dia Morto ĝojis.	

*Morto sendis mesaĝistojn por venigi La Sinjoron.
Denove, la mesaĝistoj venis dum manĝadis la dioj.
La Sinjoro ricevis instrukciojn:*

“Nun, prenu viajn nubojn,	V: 6
viajn ventojn, vian fulmon,	7
kaj viajn pluvojn kun vi.	8
Viajn sep servantojn,	
viajn ok porkojn,	9
P-d-r-j-on, filinon de Lumo, kun vi,	10
Roson, filinon de Pluvo, kun vi.	11
Ekiru celante Monton K-n-k-n-j-,	12
Levu la monton per viaj manoj,	13
la monteton viaj manplatoj.	14
Subeniru en la subteron,	15
kalkuliĝu kiel homoj enirantaj la teron.	16
Tiel, I-l-l- scios ke vi mortis.”	17
La Potenca Sinjoro obeis.	
Li amoris bovinon ĉe D-b-r-,	18
bovinon sur la kampoj de Ŝ-h-l-m-m-t-.	19
Li koitis kun ŝi 77-foje,	20
seksumis kun ŝi 88-foje.	21
Ŝi gravediĝis, kaj naskis filon.	22

(Pri la senco de ĉi tio, vidu post ĉi tiu rakonto. La Sinjoro mortis, tie en D-b-r-, kaj lian korpon trovis la mesaĝistoj. Ili raportas al Dio, la Patro, la Virbovo:

“Ni venis al la bela lando D-b-r-,	VI: 6
al la graciaj kampoj de Ŝ-h-l-m-m-t-.	7
Ni trovis La Sinjoron, li kuŝis sur la tero;	8
la Potenca Sinjoro estas morta,	9
pereis La Sinjoro, Reganto de la Tero.”	10
Afabla, Kompata Dio foriris de sia trono,	11-12
kaj sidis sur la piedapogilon.	13
Li foriris de sia piedapogilo,	
kaj sidis sur la plankon.	
Li ŝutis cindrojn sur sian kapon,	14
polvon sur sian kapon.	15
Li kovris sin per funebra mantelo.	16

Dio funebris lamente.

Li tranĉis siajn vangojn kaj mentonon,	19
li tranĉis sian brakon,	20
Traplugis sian bruston kvazaŭ ĝardenon,	21
trairis sian dorson kvazaŭ ebenaĵon.	22
Li elkriis:	
“Mortis La Sinjoro!	23
Ve, popolo de la Filo de Greno!	
Ve, popolo de Aŝr-Baal!	24
Mi subeniros al la tero.”	25
Ankaŭ Anat transvadis ĉiun monton sur la tero,	26
ĉiun monteton sur la kamparo.	27
Ŝi venis al la bela lando D-b-r-,	28
al la graciaj kampoj de Ŝ-h-1-m-m-t-.	29
Ŝi trovis la Sinjoron, li kuŝis sur la tero.	30
Ŝi kovris sin per funebra mantelo.	31
<i>Ŝi funebris lamente.</i>	
Ŝi tranĉis siajn vangojn kaj mentonon,	62(a) :3
ŝi tranĉis sian brakon,	4
Traplugis sian bruston kvazaŭ ĝardenon,	
trairis sian dorson kvazaŭ ebenaĵon.	5
“Mortis La Sinjoro!	6
Ve, popolo de la Filo de Greno!	
Ve, popolo de Aŝr-Baal!	7
Ni iru kun li en la teron.”	8
La Suno, la Dia Lumo, subeniris,	9
ĝis ŝi satis per plorado,	
trinkinte larmojn kvazaŭ vinon.	10
Ŝi kriis al la Suno, la Dia Lumo,	11
“Metu la Potencan Sinjoron sur min.”	12
La Suno, la Dia Lumo, obeis,	13
Ŝi levis la Potencan Sinjoron,	14
ŝi metis lin sur la ŝultrojn de Anat.	15
Ŝi portis lin al la Altaĵo de Capan,	16
ŝi funebris pri li,	17
Si enterigis lin,	18
metis lin en tombon da la tombaro de la terdioj.	

Si oferis 70 bovojn, oferon por la Potenca Sinjoro.	19
Ŝi oferis 70 virbovojn, oferon por la Potenca Sinjoro.	20 21
Ŝi oferis 70 ŝafojn, oferon por la Potenca Sinjoro.	22 23
Ŝi oferis 70 cervojn, oferon por la Potenca Sinjoro.	24 25
Ŝi oferis 70 kaprojn, oferon por ia Potenca Sinjoro.	26 27
Ŝi oferis 70 azenojn, oferon por la Potenca Sinjoro.	28 29
<i>kaj diversajn aliajn bestojn ŝi oferis. Sinjorino Aŝera de la Maro informiĝis pri la Morto de La Sinjoro, kaj tute ne funebris:</i>	
Ŝi iris al Dio ĉe la fontoj de la riveroj, inter la kurentoj de Oceano.	49:I: 4-5
Ŝi iris al la loĝejo de Dio, iris al la Tre Aĝa Patro,	6 7
Ŝi klinis sin antaŭ la piedoj de Dio, surteren falis kaj honoris lin.	8 9-10
Ŝi elkriis:	11
“Nun ĝoju Aŝera kun siaj filoj. kun sia tuta familio!	12
Ĉar mortis la Potenca Sinjoro, pereis La Sinjoro, Reganto de la Tero.”	13 14
Dio kriis al Sinjorino Aŝera de la Maro, “Aŭskultu, Sinjorino Aŝera de la Maro.	15 16-17
Indiku unu el viaj filoj, lin mi faros reĝo.”	18
Sinjorino Aŝera de la Maro respondis, “Ni faru J-d-‘-j-l-ĥ-n-on reĝo.”	19 20
Afabla, kompata Dio respondis, li estas tro malgranda, ne povas kompariĝi kun La Sinjoro, ne povas ĵeti lancon konkure kun la Filo de Greno.”	21 22 23-24
Sinjorino Aŝera de la Maro respondis,	25

“Do ni faru Timigan Aŝaron reĝo,	26
regu Timiga Aŝtar.”	27
Tuj Timiga Aŝtar supreniris al la Altaĵo de Capan,	28-29
kaj sidiĝis sur la tronon de la Potenca Sinjoro.	30
Sed liaj piedoj ne atingis la apogilon,	31
lia kapo ne atingis la supron.	32
Timiga Aŝtar diris,	33
“Mi ne reĝos sur la Altaĵo de Capan.”	34
Timiga Aŝtar subeniris,	35
li subeniris de la trono de la Potenca Sinjoro	36
kaj ekregis la teron de Dio.	37
<i>Do neniuun reĝon nun havis la dioj. Eble Aŝera povis ĝoji pri la situacio, sed Anat ne. Ŝi decidis mem solvi la problemon:</i>	
Unu tago, du tagoj forpasis,	II: 5
tagoj iĝis monatoj.	
Juna Anat serĉis lin.	6
Kiel la koro de bovino por sia ido,	
kiel la koro de ŝafo por sia ido,	7
tiel sopiris la koro de Anat al La Sinjoro.	8
Ŝi kaptis Morton per la rando de lia robo,	9
kaptis lin per la flanko de liaj vestoj,	10
Ŝi elkriis:	11
“Vi, Morto, donu al mi mian fraton!”	12
Dia Morto respondis,	13
“Nur petu, Juna Anat!	11
Mi transvagis ĉiun monton sur la tero,	15
ĉiun monteton sur la kamparo.	16
Oni perdis sian emon,	17
oni sur la tero.	18
Mi venis al la bela lando D-b-r-,	19
al la graciaj kampoj de Ŝ-h-l-m-m-t-.	20
Mi renkontis la Potencan Sinjoron,	21
mi traktis lin kiel ŝafviandon en mia buŝo,	22
li rompiĝis kiel ŝafo inter miaj makzeloj.”	23
La Suno, la Dia Lumo brilis,	24

sed la ĉielo haltis, pro Dia Morto.	25
Unu tago, du tagoj forpasis,	26
tagoj iĝis monatoj.	
Juna Anat serĉis lin.	27
Kiel la koro de bovino por sia ido,	28
kiel la koro de ŝafo por sia ido,	
tiel sopiris la koro de Anat al La Sinjoro.	29
Ŝi kaptis Dian Morton,	30
ŝi distranĉis lin per glavo,	31-32
Ŝi draŝis lin per ilo,	
ŝi ardigis lin per fajro	33
Ŝi muelis lin per muelŝtonoj,	
ŝi plantis lin en kampoj	34-35
Kie la birdoj manĝis la karnerojn,	
kie la birdoj detruis la karnon,	36
ĝuis la karnon.	37
Pereis La Sinjoro, Reganto de la Tero!	III: 1
Se nur vivus la Potenca Sinjoro!	2
se nur pluvius La Sinjoro, Reganto de la Tero!	3
Afabla, kompata Dio sonĝis,	4
la Kreinto viziis:	5
“La ĉielo pluvu oleon,	6
la riveroj fluu mielon,	7
Por ke mi sciu ke vivas la Potenca Sinjoro,	8
ke pluvius La Sinjoro, Reganto de la Tero.”	9
Afabla, kompata Dio sonĝis,	10
la Kreinto viziis:	11L
La ĉielo pluvis oleon,	12
la riveroj fluis mielon.	13
Afabla, kompata Dio ĝojis,	14
li metis siajn piedojn sur la apogilon.	15
Li malfermis siajn makzelojn kaj ridis,	16
Li elkriis:	17
“Mi povas sidi ripozante,	18
mi povas esti trankvila,	19
Ĉar vivas la Potenca Sinjoro,	20

pluvivas La Sinjoro, Reganto de la Tero.”	21
Dio vokis Junan Anaton,	22
“Aŭskultu, Juna Anat.	23
Diru al la Suno, la Dia Lumo	24
<i>ke la Potenca Sinjoro nun reviviĝis.</i>	
“Kie estas la Potenca Sinjoro?	IV: 28
kie estas La Sinjoro, Reganto de la Tero?”	29
Juna Anat foriris,	30
ŝi iris al ia Suno, la Dia Lumo.	31-32
Ŝi elkriis:	33
"Jen komuniko de Dio, via Patro, la Virbovo:	34
vorto de la Afabla, via Patro:	35
<i>la Potenca Sinjoro nun reviviĝis.</i>	
Kie estas la Potenca Sinjoro?	39
kie estas La Sinjoro, Reganto de la Tero?”	40
La Suno, la Dia Lumo, respondis,	41
<i>kaj promesis serĉi La Sinjoron, kiu nun revivas. Anat kaj la Suno plu konversaciis. Oni ja retrovis La Sinjoron. La Sinjoro reiris al la Altaĵo de Capan. Tie li kaptis kaj batis la filojn de Aŝera per batiloj, poste li sidiĝis sur sian tronon.</i>	
Unu tago, du tagoj forpasis,	V: 6
tagoj iĝis monatoj,	7
monatoj iĝis jaroj.	8
Post sep jaroj, Dia Morto (<i>defiis</i>) la Potencan Sinjoron.	9
Li elkriis:	10-11
“Pro vi, mi spertis honton,	12
pro vi, mi spertis draŝadon, distranĉon.	13
Pro vi, mi spertis ardigon per fajro,	14
pro vi, mi spertis mueladon per muelŝtonoj.	15
Pro vi, mi spertis (?),	16
pro vi, mi spertis plantiĝon en la kampoj.	17
Pro vi mi spertis plantiĝon en la maro.	18-19
<i>La Sinjoro kaj Morto disputis; la disputo iĝis baraktado, kaj dum kelka tempo ili vigle baraktis, sed ambaŭ ŝajnis egale fortaj:</i>	

Morto estis forta,	17
La Sinjoro estis forta;	
Ili pikis kiel virbovoj:	18
Morto estis forta,	
La Sinjoro estis forta.	
Ili mordis kiel serpentoj:	19
Morto estis forta,	
La Sinjoro estis forta.	20
Ili piedfrapis kiel ĉevaloj:	
Morto falis,	21
La Sinjoro falis sur lin.	
La Suno kriis al Morto:	22-23
“Aŭskultu, Dia Morto,	24
kial vi baraktas kontraŭ la Potenca Sinjoro?	25
Dio, via Patro, la Virbovo vin aŭdos,	26
li forprenos vian tronapogilon,	27
Li renversos vian reĝan tronon,	28
li disrompos vian sceptron.”	29
Dia Morto ektimis,	30
la Favorato de Dio, Morto, teruriĝis aŭdante ŝin.	31

Kaj Morto cedis. La Suno ricevis taskon kontroli kaj gardi la mortintajn spiritojn.

Kelkaj komentoj

Pluraj tekstoj troviĝis en la ugarita tabularo, kiuj apartenas al la poemo, sed kies enhavo estas tro detruita kaj ne plu estas deĉifrebla. En unu teksto (Gordon, *U.T.*, teksto 75 = BH) ni legas sufiĉe por lerni ke Dio ordonis al du sklavinoj, Tuliŝa, sklavino de Luno, kaj D-m-g-j-, sklavino de Aŝera, ke ili iru en la dezerton. Kie ili nasku “manĝantojn,” kies vizaĝoj estas bovaj. Tie vidas ilin La Sinjoro, kaj amoras ilin. Sed nenio plu estas deĉifrebla.

Parto de alia teksto (Gordon, *U.T.*, teksto 76 = IV AB) estas parte legebla en la dua kolono, kaj la teksto helpas iomete pri la poemo:

La servistoj de La Sinjoro respondis:	3
---------------------------------------	---

“Jen la Sinjoro en sia domo,	4
Dia Hadad en sia palaco.	5
Li prenis sian pafarkon per la manoj,	6
siajn sagojn per la mano,	7
Nun li iras,	8
celante la kampon Ŝ-m-k-, kie abundas bovoj.”	9
Juna Anat ekflugis,	10
ŝi ekflugis, kaj rapidis,	11
Al la kampo Ŝ-m-k-, kie abundas bovoj.	12
La Potenca Sinjoro levis siajn okulojn,	13
li levis siajn okulojn kaj rigardis,	14
rigardis Junan Anaton,	15
la plej belan fratinton de La Sinjoro.	16
Li marŝis al ŝi, li haltis,	17
li klinis sin antaŭ ŝiaj piedoj.	18
Li elkriis:	19
“Saluton, fratino	20
<i>la sekvantaj kelkaj linioj ne estas tradukeblaj.</i>	
Ni plantos miajn malamikojn en la tero,	24
la kontraŭantojn de via frato en la grundo.”	25
Juna Anat levis siajn okulojn,	26
ŝi levis siajn okulojn kaj rigardis.	27
Ŝi vidis bovinon, kaj rapidis	28
<i>la postaj linioj ne estas tradukeblaj. Sed en la tria kolono ni legas</i>	
Ŝi naskis bovidon, por La Sinjoro,	III: 21
virboveton por la Nub-Rajdanto.	22
<i>kaj poste</i>	
Plorante, ŝi iris al Ar-r-,	30
al A-r-r-, kaj al Capan,	31
Al bela T-l-ij-t-.	32
Ŝi parolis al La Sinjoro,	33
“Aŭskultu ĝojigan informon, Sinjoro,	34
Filo de Greno, aŭdu!	35
Bovido naskiĝis per La Sinjoro,	36
virboveto per la Nub-Rajdanto.”	37
La Potenca Sinjoro ĝojis.	38

En alia teksto (Gordon, *U.T.*, teksto 129, = 111 AB,C), ni legas fragmentojn de rakonto, kiu probable estis parto de la komenco de la poemo. La teksto ne estas sufiĉe certa por ebligi tradukon, sed ŝajne rolas en ĝi Aŝtar, Maro, kaj la Suno. Aŝtar kaj la Suno baraktadas, kaj la Suno pacigas ilin, uzante la samajn vortojn kiel dum la baraktado de Morto kaj La Sinjoro poste en la poemo. Ankaŭ tie, la kaŭzo de la disputo ŝajnas esti palaco, kiun volas konstruigi Maro.

Aludoj en la Biblio

Kiel scias ĉiu leganto, Baal (kaj “la Baaloj”) estas tre ofte menciata en la Biblio. Baal (“La Sinjoro” en nia traduko) estas la plej grava dio palestina, kvankam nur filo de la potenca Dio, la Patro, la Kreinto, la Afabla, la Kompata. Dio la Patro jam estas ja nur Dio, kaj, kiel ni scias, ekzistas nur unu Dio. Pro tio, la Hebreoj tute trankvile akceptis tiun figuron, kaj ties ugarita nomo ’ēl estas adoptita de la Hebreoj (אל) kaj uzita normale por Dio. Sed Baal kompreneble ne estis figuro uzebla en Jahüismo, kvankam ni scias per la Biblio ke li tamen estis tre populara dio inter la Hebreoj.

Nur kelkaj aludoj en la poemo pri Baal kaj Anat troveblas en la Biblio, kaj ĉiukaze ili estas reformitaj, kaj aplikitaj al Jahüe: (novaj tradukoj por ĉiu el la sekvantaj tekstoj)

Jesaja 27:1:

Tiam Jahüe sendis punon per sia granda, solida,
potenca glavo
al Lotan, la malbona Serpento,
al Lotan, la tordiĝanta Serpento,
mortigis la monstron de la Maro.

Psalmo 74:13-15:

Vi detruis Maron, per via potenco,
vi rompis la kapojn de la monstroj sur la akvo.
Vi rompis la kapojn de Lotan,
vi elmetis lin kiel manĝaĵon por la demonoj.
Vi fendis la fonton kaj kurenton,
vi sekigis la ĉiamflujajn riverojn.

Psalmo 104:25-26:

Jen la granda Maro, tre vasta,
jen la nekalkuleblaj rampbestoj,
etaj kaj grandaj.
Jen iras la ŝipoj,
kaj Lotan, kiun vi kreis kiel ludilon.

Ijob 8:8:

Malbenu ĝin, homoj kiuj malbenas Tagon,
pretaj veki Lotanon.

Ijob 40:25:

Vi eltiris Lotanon per fiŝhoko,
vi ligis lian langon per ŝnuro.

Jesaja 51:9-10:

Vekiĝu, vekigiĝu, armu vin!
Brako de Jahŭe vekigiĝu, kiel antikve,
kiel dum la pasinta tempo!
Ĉu ne vi dishakis Rahabon,
mortigis la monstron?
Ĉu ne vi sekigis Maron,
akvon de granda Oceano?
Kiu faris vojon el la marvaloj,
por ke suriru ilin la savitoj?

Psalmo 89:10-13: (en tradukoj, 89:9-12)

Vi regas la arogantan Maron,
kiam ĝi levas siajn ondojn, vi silentigas ilin.
Vi disrompis Rahabon, kiel por mortigi,
per via potenca brako vi disigis viajn malamikojn.
Via estas la ĉielo,
via estas la tero,
vi faris la fundamenton por la tero kaj ĝia enhavo.
Vi kreis Capanon kaj Jaminon,
Tabor kaj Hermon krias pro via nomo.

Ijob 26:7:

Li etendis Capanon super la abismo,

vi pendigis la teron super la vakuo.

Ijob 26:12-13:

Per sia potenco li silentigis la Maron,
per sia scio li detruis Rahabon,
Per sia vento li poluris la ĉielon,
lia mano mortigis la malbonan Serponton.

Evidente la poemo pri Baal kaj Anat bezonas multan diskuton, kaj tio ne estas ebla ĉi tie, sed devos atendi alian oportunon.